

Conrad Ferdinand Meyer,
Paco sur tero

tradukita de Willy Nüesch

La paŝtistoj en libero
Lasis gregon, l' anĝelvorton
Portis tra la basan pordon
Al patrino kaj infan'.
Plu kantadis en lontan'
Ĉielgent' en spaco stela,
Plu sonoris la ĉiela
"Paco, paco sur la tero!"

Ekde tiu vort' anĝela
Ho ve, kiom da kruela
Faris la militkolero
En kiras', sur rajdobest'!
Ofte dum kristnaska fest'
Ĥor' spirita kantis time,
Insistpete, plendesprime:
"Paco, paco ... sur la tero!"

Sed eternas kredregulo,
Ke ne ĉiam la feblulo
Iĝos pred' kaj rabkonkero
De aroga murdogest':
Iaspeca justo-est'
En horor' kaj murdo rolas,
Regno sin konstrui volas,
Serĉas pacon sur la tero.

...

Conrad Ferdinand Meyer,
Paco sur la Tero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kiam la paŝtistoj sian
Gregon lasis kaj la Dian
Vorton portis tie iam
Tra la pordo de kaban'
Al patrino kaj infan',
Kantis plu la anĝelar'
Kun promes' al la homar':
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Kantis tiel l' anĝelar',
Spertis tamen la homar'
Kiom da sufer' de tiam
Pro milito kaj malam'
En la Sankta Nokto jam!
Kantis ili petegante
Kaj mallaŭte akuzante:
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Estas tamen daŭra kredo,
Ke la malfortul' ne predo
De perforto estu ĉiam.
Batos iam ties horo,
Eĉ en murdo kaj teroro
Da justec' enestas io.
Estos hom-generacio,
Kiu pacon serĉos iam.

...

Iom post iom ĝi formos
 Sin, oficos sankte, forĝos
 Batalilojn sen danĝero,
 Flamoglavojn por la rajt'.
 Filoj kun forteco-trajt',
 Reĝa gento ekburĝonos,
 Kies helaj tubjoj sonos:
 Paco, paco sur la tero.

*Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, *1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-101-274 (2013-08-28 18:38:58)

La tradukinto, s-ro Willy Nüesch (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tel. 0041-31-302 66 56), donis al mi, Manfred Retzlaff, en 2005-07-11 la skriban permeson pri la publikigo de tiu ĉi poemo en mia retejo "www.poezio.net". La poemo enestas ankaŭ en la libro "Elektitaj poemoj de Conrad Ferdinand Meyer", kiun eldonis s-ro Willy Nüesch. Ĝi estas aĉetebla ĉe li aŭ ĉe la libro-servo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).

Malrapide ĝi formiĝos,
 Ĝia tasko plenumiĝos.
 Forĝos ĝi armilojn iam,
 Kiuĵ estos sen danĝer',
 Kiuĵ portos al la Ter'
 Pacon, kiu ne plu ĉesas,
 Kiel l' anĝelar' promesas:
 Paco sur la Ter' por ĉiam!

*Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, *1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-12-12.*

MR-411-1 / Arg-101-206 (2005-08-01 13:06:34)

Conrad Ferdinand Meyer estis svisa poeto, verkisto kaj tradukisto, kiu naskiĝis en la svisa urbo Zuriko (Zürich), verkis precipe en la germana lingvo lirikaĵojn kaj romanojn, sed ankaŭ romanojn en la franca lingvo. Pliaj detaloj pri lia vivo troveblas en la interreto interalie en <http://www.xlibris.de/Autoren/MeyerMeyer-Biographie/Meyer-Biographie-03.htm>.